

Jarkunveno de Grupo Esperantista de Trondheim, 27an de februaro 2017 ĉe Ulf Stenhaus, Arne Solbergs veg 32

1. Aprobo de la kunvoko

La kunvoko aprobiĝis.

2. Malfermo de la jarkunveno

La prezidanto malsanis, sed la ĉeestantoj decidis malfermi la jarkunvenon eĉ sen la martelo.

3. Aprobo de la tagordo

Unu membro demandis, ĉu ni ne bezonas tagordon pri buĝeto, sed la kasisnto respondis ke ne. Li ankaŭ ne preparis buĝeton. La jarkunveno aprobis la tagordon sen enmeti tagordon pri buĝeto.

4. Elekto de kunvena prezidanto, raportanto kaj 2 subskribantoj de la protokolo

Kjell Heggvold Ullestad elektiĝis kiel kunvena prezidanto. Kiel raportanton oni elektis Jardar Eggesbø Abrahamsen. La protokolon subskribos Judith Parelie Abrahamsen kaj Herman Ranes.

5. Jarraporto 2016

Oni laŭtleĝis la jarraporton, faris kelkajn malgrandajn modifojn kaj aprobis ĝin kondiĉe ke unu informeto konfirmiĝos post la jarkunveno.

6. Jarkalkulo 2016

Kasisto Ulf Stenhaus prezentis la jarkalkulon. Revizoro Jørgen Åldstedt akceptis la jarkalkulon. La jarkunveno aprobis la jarkalkulon.

7. Elektaj

La elekta komitato proponis reelekton de ĉiuj estraranoj. La jarkunveno elektis laŭe. La ĝisnuna revizoro (Jørgen Åldstedt) petis novan personon por la posteno, sed pretas resti en la posteno se ni ne trovos aliulon. La jarkunveno proponis Bergny Dahl, sed ne sukcesis kontakti ŝin dum la kunveno. La jarkunveno komisiis al la estraro trovi personon por la posteno. La 28an de februaro 2017 Bergny Dahl akceptis la postenon, kaj estas tial konsiderata kiel elektita.

Prezidanto: Torstein Kvakland (reelekto)
Kasisto: Ulf Stenhaus (reelekto)
Sekretario: Jardar Eggesbø Abrahamsen (reelekto)
Estrarano: Herman Ranes (reelekto)
Anstataŭanto: Christian Fossen (reelekto)

Revizoro: Bergny Dahl (nova)
Kunordiganto de la vortara projekto: Jørgen G. Bosoni (reelekto)
Responsulo pri la biblioteko: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la arĥivo: Torstein Kvakland (reelekto)

La jarkunveno decidis proponi reelekton de la elekta komitato, kaj poste la jarkunveno elektis laŭe:
Elekta komitato: Jørgen G. Bosoni (reelekto) kaj Kjell Heggvold Ullestad (reelekto)

8. Envenintaj proponoj

Neniu propono envenis.

9. Fermo de la kunveno

La prezidanto de GET ne ĉeestis, sed la kunvena prezidanto fermis la kunvenon.

Post la jarkunveno ni kafklaĉis.

Ĉeestis 6 membroj kaj 1 bebo.

Raportis: Jardar Eggesbø Abrahamsen

Subskribis: Judith Parelie Abrahamsen

Herman Ranes

Styret på norsk

Under sak 7 på årsmøtet i Grupo Esperantista de Trondheim (Trondheim esperantoklubb) 27.2.2017 vart dette styret valt:

Leiar: Torstein Kvakland
Kasserar: Ulf Stenhaus
Sekretær: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Styremedlem: Herman Ranes
Vara: Christian Fossen

Referent: Jardar Eggesbø Abrahamsen

Underskrivarar: Judith Parelle Abrahamsen Herman Ranes